

Bulgaria ESPERANTISTO



БЪЛГАРСКИ ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗ

МЕЖДУНАРОДНИ КУРСОВЕ ЗА УЧИТЕЛИ И КУРСОВИ РЪКОВОДИТЕЛИ ПО ЕСПЕРАНТО

7—26 август, Бургас

А. За изучаване на езика:

I степен, II степен, III степен

Б. За преподавателска правоспособност по Есперанто

В курсовете се приемат с предпочитание **учители и курсови ръководители** (непрофесионални преподаватели по есперанто). Приемането става въз основа на документ за издържан изпит за предходната степен.

Всекидневно 4 учебни часа. Останалото време се използва по желание (плаж, разходка, екскурзии и пр.)

Срок за записване: 31 май.

Такса за българи: 70 лв. (храна, квартира, обучение, административни разходи). Суми изпращайте на адрес: **ДСК Благоевски район, сметка 185/2553 на Софийско окръжно есперантско роководство, бул. Хр. Ботев 97, 1003 София.**

В общежитието не се допускат деца и некурсисти.

Подробности искайте от: **Окръжно есперантско ръководство, бул. Хр. Ботев 97, 1303 София.**

Елате да се усъвършенствувате по езика в приятна международна есперантска среда!

ENNAVO

* * * Bulgaraj esperantistinoi, plenforte al la 63-a UK!	I
Penka Papazova. Poemo pti la virino	2
* * * La rezultoj de nia literatura konkurso	2
Aleksej Nedogonov. La Samara Standardo. Traduko de Al. Logvin	3
Nadja Sirkova. La cikatrilo	3
Tenjo Tončev. La grandanimeco kaj la nobleco de la rusa popolo	6
I. N. Dančenko. Nokta batalo (daŭrigo)	8
Ĥrima. Rememoro pri Flora	11
Anton Antonov. Vintra Amika Esperanto-Renkontiĝo (VARE-78)	12
Ĵivko Kolev. Aktiva disvastigo de Esperanto en la distrikto de Stara Zagora	13
* * * La kongreso de la Aŭstra Komunista Partio — 223 : 13 por Esperanto!	13
Kampanjo „Esperanto en turismo“. Pri la esp-istaj tendaroj kaj renkontiĝoj	14
Géza Kurucs. Ĉu vi opinias simile?	15
* * * Lingva laboratorio	16
Ivan Vojnov. Granda venko de bulgara ŝakmajstro-esperantisto	19
Ljudmila Jevsejeva. Unusola en la mondo	III
* * * Forpasis la Esperanto-doĵeno Penko Petrov	III
Viktor Gonzalez. Sapiro (teksto kaj muziknotoj)	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Nova kvartalo en Varno — la urbo de la 63-a UK de Esp-to. Antaŭe vidiĝas la ŝipforma kongresejo.

Redakta komitato:

Kunĉo VÁLEV (ĉefredaktoro), Nevena ALEKSIEVA, Marin BĀCEV, Ljuba BOJAĜIEVA, Ĥristo GOROV, Asen GRIGOROV, Dimitro DENČEV, Dimitro HAĜIEV, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI, Vasja PETROVA.

Korektis: Rajna Konstantinova

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTOJ NATURAMIKOJ (IREN)

17--26 de julio 1978, Pécs, Hungario

Esperantistoj, naturamikoj, turistoj! Partoprenu amase en la 11-a IREN en la pitoreska ripozejo Abaliget, Hungario (en la okcidenta parto de montaro Mecsek, proksime de urbo Pécs). En la ĉiam interesa programo: interkona kaj adiaŭa vesperoj, piedaj kaj aŭtobusaj ekskursoj, amuzaj klubvesperoj, konkursoj pri naĝado, orientiĝo ka., ĉiutagaj lingvoperfektigaj kursoj, laga solenaĵo, folkloro danĉprezentado, bivakfajro ka.

Noktado en unu-, du- kaj kvarlitaj ĉambroj, en ok- kaj dudekkvarlita turista domo kaj en kvarlita kampadeja domo.

Kotizoj: de 1200 ĝis 1800 forintoj. Eblas ankaŭ uzi propran tendon. La kotizoj inkluzivas noktadon, 3-fojan manĝon kaj ĉiujn programerojn. Por gejunuloj ĝis 25-jaraĝo estas rabato.

Limdato de aliĝo: 31 de majo 1978.

Adreso: Esperanto-Komitato, H-7601 Pécs, PF. 2, Hungario.

**BULGARAJ ESPERANTISTINOJ, PLENFORTE AL LA 63-A UK!**

En nia nova, socialisma socio jam malaperis la ofendaj vortoj „virina laboro“. Ili jam estas en la historio. Hodiaŭ la bulgara virino plenvalore aktivas en ĉiuj sferoj de la nacia vivo — socia-politika, ekonomia, kultura, scienca-teknika, arta. Por ĉiam liberigita el la katenoj de socia subpremo kaj senrajteco, inspirata de la patrinecaj zorgoj de la Bulgara Komunista Partio kaj la popola ŝtato, nun la bulgarino estas aktiva konstruanto de la nova vivo en nia patrujo, senlaca sociaganto kaj zorgema patrino. Per sia profunda sento pri la novo, per sia scipovo krei teneron kaj belon ŝi aktive kontribuas por la edukado de nova homo en nia lando — ideo hardita, fizike sana, spirite riĉa, vigla, optimisma.

Samtempe la bulgarino aktive partoprenas la batalon por plena forigo de ĉiu diskriminacio kontraŭ la virino en la tuta mondo. Sub la nobla slogano „egalrajteco, evoluo, paco“ ŝi laboras kaj batalas por plivastigo kaj profundigo de la malstreĉeco en la internacia vivo, por reala malarmiĝo — kontraŭ la provokoj de lokaj militoj kaj preparo de granda milito, kontraŭ kia ajn preparo kaj produktado de amasmortigaj armiloj, nun unualoke kontraŭ la neŭtrona — la lasta plej antihumana minaco de la imperiismo.

En tiu plej grava batalo la bulgaraj virinoj-esperantistinoj donas sian realan kontribuon. Post sia vigla aktiveco dum la Internacia Jaro de la Virino (1975) kaj dum la jaro de nia impona 38-a nacia E-kongreso (1976), nun la bulgaraj esperantistinoj staras antaŭ nova, multe pli granda tasko: doni ĉiujn fortojn kaj scipovojn por bonega preparo kaj brila okazigo de la 63-a Universala Kongreso de Esperanto en Varno. Por respondi inde al tiu gravega tasko ili devas antaŭ ĉio decide plialtigi sian parolkapablon. Nur tiel ili povos plenvalore partopreni en ĉiuj kongresaj laboroj kaj aranĝoj, samkiel persone efektiviigi utilajn kontaktojn kun la kelkmiloj da kongresanoj el ĉiuj anguloj de la tero. Nur per bona regado de la lingvo la bulgaraj esperantistinoj povos prezenti bone siajn landon kaj popolon, prezenti ankaŭ sin mem kiel vere gastamaj kaj kulturaj gastigantoj.

Enkadre de UK okazos ankaŭ la tradicia kunveno de la virinoj. Tie diversnaciaj esperantistinoj rakontos pri la stato de la virino en siaj landoj, pri sia persono vivo kaj profesio, pri la partopreno de la virinoj en la E-movado ktp. Jen forumo, kie la bulgaraj esperantistinoj povus kun utilo prezenti siajn opiniojn kaj proponojn, interŝanĝi spertojn.

Sendube, la plena sukceso de la 63-a UK altgrade dependas de la laboro de la bulgaraj esperantistinoj. Tiel ili konscie jungu siajn energiojn kaj scipovojn en plenumado de konkretaj kongrestaskoj, en konkreta laboro por dis-

vastigo de Esperanto en sia leĝleco, per ĉiuflanka aktivigo kaj stabiligo de ĉiu E-societo, sekcio, distrikta estraro. Ni zorgeme kaj prudente ekspluatu la pli favorajn kondiĉojn por Esperanto dum la kongresa jaro kaj tiel preparu la grundon por novaj, pli grandaj kaj daŭraj sukcesoj de la E-movado en nia lando.

Al laboro, karaj bulgaraj esperantistinoj, al labro obstina, energia kaj sindona — por brila okazigo de la 63-a UK de Esperanto en Varno!
Penka Papazova

POEMO PRI LA VIRINO

Virino,
Via nomo venas de l'jarcentoj
kiel simbolo de amo kaj beleco,
kiel Safó,
kiel Penelopo,
kiel promesplena juneco!
De via rigardo la mondo ekfloras,
viaj manplatoj pli milde karesas nin.
Vi venas kiel doloro kaj ĝojo,
vi estas nia amata patrin'!
La amon vi rekreas en vivon,
vi pretas eterne doni
kaj suferi,
portante la ŝarĝon de ago
kaj progreso,
ĉiujn obstaklojn elteni. . .
Virino,
nia kareso kaj glavo,
nia sun' kaj tempesto,
en via sino la vivon vi lulas..

Heroldo de paco
kaj amo,
ĉion al ni vi donas
kaj prenas!
Vi devas esti ĉio sur tiu ĉi tero,
doni vivon kaj mildecon,
vi, la malforta, sed necesa
por la fortaj,
estu eterno! . . .
Virino,
via nomo venas de l'jarcentoj,
kiel simbolo de amo kaj esper' . . .
Por vi ne ekzistas blankhaŭtaj
kaj nigraj,
por ĉiuj homoj vi estas amata patrin'!
Vi ne deziras millton,
malamas la morton,
la tuta mond' enteniĝas en via kor'. . .
Vi deziras pacon sur nia planedo,
ke ĉiuj homoj havu panon,
ke manku dolor'!

LA REZULTOJ DE NIA LITERATURA KONKURSO

En la Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto“, dediĉita al la 100-jara datreveno de la Liberigo de Bulgario el otomana jugo, partoprenis 15 aŭtoroj kaj tradukistoj per 21 konkursaĵoj. El ili 10 pecoj estas poezio kaj 11 — prozo (12 originalaj kaj 9 tradukitaj).

Poezio

originala:

I, II kaj III premioj: nealjuĝitaj

tradukita:

I premio: „Al la libero“ de I. Vazov, traduko de Simeon M. Simeonov

II premio: „La Samara Standardo“ de Aleksej Nedogonov, traduko de Al. Logvin (USSR)

III premio: „Patrujo“ de L. Stefanova, traduko de Nadia Andrianova (USSR)

Originala prozo

I premio: „La cikatrilo“ de Nadja Sirkova

II premio: „Antaŭ cent jaroj“ de Nevena Neĉelĉeva

„La nekonata ribelulo“ de Stefan Sikolov

III premio: „La maestro“ de Asen Lincev

Laŭda mencio: „La urbo serĉas ĝemelon“ de Anatolij Stecenko (USSR);

„Fajreroj de la libero“ de Enĉo Balinvo
La redakcio gratulas la premiitojn kaj bondeziras al ĉiuj partoprenintoj en la konkurso pli grandajn kreajn sukcesojn!

Karaj geamikoj-esperantistoj!

Ankoraŭ restas literaj abonoj de «EE» por 1978 j. Kelkaj E-societoj ne atingis la planitajn ciferojn. Do ĉiuj, kaj aparte ili, kolektadu plue novajn abonojn!

Ni nepre atingu 6100!



*II premio en la
Literatura Konkurso*

*Aleksej Nedogonov
(1914—1948)*

LA SAMARA STANDARDO

Fulmotondre trairis Balkanojn
la sovaĝa otomana band'.
Post la fajro kaj la jataganoj
nigrajn tagojn ekvivis la land'.

Tamen malgraŭ la distanco vasta
la sciligo pri l'malĝoja sort'
venis kvazaŭ per flugiloj haste
al la stepoj ĉe la Volga-bord'.

Tie loĝis antikvaj bulgaroj. . .
Kaj la nepoj el tiu patri'
ĵuris nepre batali por kara,
torturita ĝis mort' Bulgari' !

. . . Ses taĉmentoj de volgaj bulgaroj,
civilitanoj de frata Rusi',
sub standardo de urbo Samaro
jen ekmarŝis al fronta lini'.

La popolarmeanoj kun gloro
batis turkojn ĝis la venka fin'.
La standardo ĉe Stara Zagora
senmortiĝis en batala fum'.

Kiel ĝi en la vento tremetis,
la sankataĵo de l'frata Rusi'!
Ĝin la fort' de l'fajro ne forĵetis,
nur fiere ĉiam flirtis ĝi !

Sub ĝi falis sindonaj bravuloj,
sed ĉirkaŭe fermiĝis taĉment'. . .
Jam trifoje turkaj sovaĝuloj
prenis ĝin, tamen nur por moment'!

Teruriĝis la turkoj pro l'arda,
pro la firma bulgara pasi'.
Kvazaŭ luktis sub tiu standardo
ne taĉmento, sed tuta Rusi' !

El la rusa: Aleksandro Logvin

*I premio en la
Literatura Konkurso*

Nadja Sirkova

LA CIKATRITO

Dum mia infaneco mi tre amis
mian avon Petro, kiu partoprenis en
la Rusa-Turka Liberiga Milito. Por
mi la plej varma kareso estis la lia.
En la kvartalo ne estis pli belaj ol
la sledoj, kiujn mia avo faris por mi.
Li kuracis miajn ĉiam gratvunditajn
genuojn sen moralinstruo kaj rakontis
al mi la plej ĉarmajn popolajn fabelojn,
kiajn poste mi nenie tralegis. . .

Li, la patro de mia patrino, duon-
klera homo el la montaraj vilaĝetoj
ĉirkaŭ Trojan, estis elokventa kaj tre
ŝercema. Ankaŭ nun mi rememoras,
kiel tenere li tiris la longajn harplek-
taĵojn de mia avino kaj nomis ŝin
„malgranda nimfo“. Tiutempe ni am-
baŭ silabis la fabelojn de Andersen
kaj estis sub la influo de la granda
dana sorĉisto.

Sed plej rimarkinda ĉe mia avo
estis la vizaĝo kun malnovaj cikatroj.

Aparte frapanta estis la cikatro sur
la gorgo. Tie verŝajne la vundo estis
terura — jam kvindek jarojn ekde kiam
li ricevis ĝin, kaj ĝi ĉiam ankoraŭ
ruĝis je siaj disŝiritaj randoj.

Avo Petro ne ŝatis rakonti pri sia
pasinteco, tial mi nur unu fojon
aŭdis la historion de tiu vundo. Jen
kiel tio okazis.

Iu ĵurnalisto venis hejmen por in-
tervjui mian avon lige kun la kvin-
deka datreveno de nia liberiĝo el la
otomana jugo. Tio okazis vespere,
post la manĝo. Nia familio estis, kiel
ordinare, en „la granda ĉambro“ —
ĉiu en sia anguleto. Panjo korektis
amason da kajeroj de lernantoj, paĉjo
ŝargis kartoĉojn — la sekvan tagon
li intencis iri kun avo je ĉasado.
Surmetinte blankajn littukojn ili ĉa-
sos sovaĝajn anasojn sur la glaci-
ginta rivero. Avo ne estis ĉasisto,

sed ĉiufoje akompanis patron. Sidante sur mia malgranda seĝeto ĉe la kahela forno, mi pentris la maljunulon per pasteloj. Li pozis surrajdinte seĝon, sed mi pentris lin sur blanka ĉevalo kaj kun standardo enmane. . . Apud li dormetis kun la ŝpinilo „la malgranda nimfo“ kaj ĉe liaj piedoj ĝuis feliĉon la ĉasista hundino Fifi. La avo venigis ŝin varmiĝi — por teruro de la virinoj. Paĉjo ankaŭ estis mal-kontenta pri tio. Li ĝenerale malkontentis pri avo, opiniante lin egemal-praktikema homo, tiel fidema, ke ĉiu povus trompi lin. En la patran kontoron avo kondukis unu post alia preskaŭ ĉiujn siajn samvilaĝanojn kaj petis lin pledi senpage en iliaj enuaj kaj simplaj procesoj, ordinare pri peco da tero, pri heredaĵo aŭ ŝuldo.

Tiun vesperon paĉjo kaj avo denove ekkverelis — la maljunulo klopodis por iu el siaj amikoj. Kiel nun mi rememoras, temis pri ia azeno. Patro, kiu tiutempe havis iujn maltrankvilaĵojn, rifuzis pledi por tiu homo. Avo sentis sin ofendita kiel infano.

Tiam ĝuste venis la ĵurnalisto kaj komencis doni siajn demandojn. Komence avo ruzis. Unue li ŝajnis sin dormanta, poste diris, ke li ĉion forgesis. Patro koleris. Li kaŝis sin malantaŭ ĵurnalo „Zora“ — „la koruptita registara ĉifono“, kiel li nomis ĝin. . .

Finfine mia avo ekparolis. Mi ne komprenis ĉion, ĉar tiam mi estis nur dekjara. Iuj detaloj fariĝis klaraj al mi poste per la helpo de miaj gepatroj. Sed mi pretendas, ke tio estas la plej fidinda varianto de la avo „odiseado“, kvankam la plej mal-longa.

— Mi ne ŝatas paroli pri pasintaj aferoj, — komencis li. — Multajn karajn mortintojn mi vekos kaj de tio mi ne sentos faciligon. . . Antaŭ ĉio mi rememorigos pri la patrino fratinino — mia malgranda onklino Rada. Svelta kaj brunvizaĝa, tre simpatia. Vidis ŝin turko-alivilaĝano kaj decidis ŝin forŝteli. La bulgarino brul-

pikis lin per siaj nigraj okuloj. . . Akompanita de ankoraŭ du turkoj sur ĉevaloj, li fortrenis ŝin malkaŝe, de la fontano.

Du tagojn mi ne manĝis, ĵetis min kiel freneza kaj je la tria mi bruligis la pajlostakojn de tiu, al kiugastis la aĉulo.

— Mi estis nur iom pli granda ol ci, Peĉjo, kiam mi proklamis militon al la turkoj, — ekridetis avo. — Proklamis ĝin antaŭ ol la rusoj.

Kiam la rusoj transpasis Danubon, mi estis deksejara. Nian grandan ĝojon kaj feliĉajn larmojn vi ne povas kompreni, ĉar vi ne konas la jugon, ĝian amaron. . . Dum la soldatoj atendis forveturon, ni regalis ilin kaj iliajn ĉevalojn. Mi tamen sentis grandan honton: miaj samvilaĝanoj volonte buĉis brutojn kaj alportis viandon al la milita kampokuirilo, sed en nia malriĉa stalo estis nenio krom unu malgrasa bovineto. Ĝi estis jam maljuna kaj ne plu donis lakton, sed ni tre amis ŝin, precipe panjo — la milda besto estis kiel ŝia infano. Mi estis certa, ke panjo ne konsentos pri buĉo de la bovineto, tial mi intencis forŝteli ŝin. . .

Ĉe tiuj vortoj de mia avo paĉjo ekmoviĝis malantaŭ la ĵurnalo. La maljunulo alrigardis rapide lin, poste min kaj edife diris:

— La ŝtelo estas granda peko, mia knabo, sed mi deziris fari ĝin pro amo al tiuj malsataj, barbokovritaj kaj bonkoraj homoj, kiuj forlasis siajn hejmojn kaj venis morti por nia libero. Sed ŝtelo ne estis: en la nokto mi penetris en la malantaŭan korton kaj vidis panjon sub la remizo kun petrollampeto en mano. Ĉe la malforta lumo paĉjo senfeligis la buĉitan jam bovinon. Panjo forte premis dentojn, sed ne ploris. Male: mi ekplore-
gis en la mallumo. . .

La taĉmento de generalo Karcov ricevis taskon transpasi la Balkanon tra nia Trojana Intermonto por iri helpe al generalo Radecki, kiu batalis kontraŭ la turkoj ĉe Sipka—Sejnovo. La tu-



la loĝantaro ekkuris disŝoveli la neĝajn lavangojn. Centoj da bulgaroj faris vojon por la kanonoj tra la intermonto. Niaj veturiloj kaj sledoj grimpis sur la krutaĵo, ŝargitaj per nutraĵo kaj furaĝo por la rusa armeo. Tiutempe mi estis en la ribelula grupo de Ceko Petkov. Ni, kvarcent personoj, ekstaris frunte de la unua kolono de la taĉmento, agante kiel kondukantoj kaj skoltoj, ĉar tiuj vojetoj estis al ni konataj. Sed ĉiu vojeto tiam, dum la rigora vintro, ne estis jam la sama. . . Balkano estis fremda kaj nekonata, nereale blanka kaj dronanta en nebulo. Kia frostego estis — mi ne povas rakonti al vi! Ni donis pli da viktimoj pro la frosto ol pro mortigoj kaj vundoj.

La turkoj fortikiĝis malantaŭ la roko „Orlovo Gnezdo“ kaj ni grimpis tien sub ilia kanonado. Tri tagojn ni batalis en la dika neĝo, sen varma nutraĵo, en niaj eluzitaj vestoj. Je la kvara tago ni forpuŝis la malamikojn el iliaj tranĉeoj kaj persekutis ilin al Kârnares. . .

Avo eksilentis kaj profunde enpensiĝis.

— Ĉu tiam. . .? — demandis la ĵurnalisto kaj montris per okuloj la grandan cikatron.

Mia maljunulo kapjesis.

— La turkoj kuris sur la krutaj sudaj deklivoj de la montaro, forlasante ĉion — armilojn, mortigitojn, vunditojn. Malgraŭ ke miaj piedoj estis frostiĝintaj, mi kuratingis grandan turkon, kiu stumblis kaj falis. Pro tio mi transkapiĝis kaj poste ekmemoris nur liajn timigitajn okulojn, la bajoneton kaj la teruran doloron, kiu disŝiris mian gorgon, sufokis min kaj mi dronis en densa, nigra mallumo. . . Kiam mi elnaĝis el la mallumo, mi vidis rusan kapuĉon, kliniĝintan super mi, kaj prujnokovritajn barbon kaj lipharojn. „Bratec! Golubĉik!“¹ — nur tion mi komprenis el la rusa flustrado. Io malakutigis la fajran doloron — la homo estis bandaĝinta min. Kelkfoje mi perdis konscion kaj kiam mi rekon-

sciigadis, ĉiam la kapuĉo estis antaŭ aŭ super mi. Iom poste mi komencis vidi ĝin sub mi — verŝajne la homo portis aŭ tenis min. En iu momento, tute senfortiĝinta, li alligis min sur la dorso per miaj du glavrimenoj kaj tiel rampis malantaŭen al „Orlovo Gnezdo“.

Avo ĝemis kaj malgaje daŭrigis:

— Poste sanitaristoj prenis min kaj sendis min en lazareton. Tutan jaron mi estis en hospitaloj kaj neniam sukcesis vidi mian savinton, eĉ lian vizaĝon mi ne povis rememori. Poste panjo dum sia tuta vivo ploris, ke ŝi ne scias almenaŭ lian nomon por menciigi ĝin en siaj dankaj preĝoj. . .

Avo enpensiĝis.

— Kio igis tiun paceman rusan homon oferi sian sangon por ni? — diris li. — Trolacigita, malsata kaj duonfrostiĝinta — kio igis lin batali kontraŭ la morto? Ĉu ni povas kompreni la vastan kaj justan rusan animon!

Mia patro ne plu kaŝis sin malantaŭ la ĵurnalo, eĉ ne bruetis averte per ĝi.

La vizitanto, kiu estis lojala al la registaro, ekridetis acide:

— Ho, tute ne estis „pacema“ la muĵiko², pri kiu vi kantas psalmojn, avo Petro! Li ekavidis teron kaj aŭtoritaton kaj forigis la caron! Li pensas, ke li povus administri sola!

— Sed pro kio devas esti caro, kiam estas Lenin! — ŝajne naive diris avo. — Lenin pli bone konas la zorgojn de la popolo, ĉar li mem estas el la popolo. Dio alte, caro malproksime!

— Vi estas maljuna homo, avo, religia, ĉu vere vi aprobas la komunismojn, kiuj ne kredas je dio? — demandis incitite la gasto.

Minuton avo rigardis lin atente kaj poste mallaŭte ekdeklamis:

Dio mia, justa dio
ne vi en ĉiela foro,
mi nur preĝas al vi, dio,
kiun sentas mi en koro. . .

En la ekestinta silento impone eksonis la senmortaj versoj de Botev³.

La vizitanto subite ekrapidis foriri. Ĉe la pordo kvazaŭ ŝerce li diris al mia patro:

— Sinjoro V., mi konsilas vin atenti — en via hejmo estas danĝera komunisma agitanto!

Post lia eliro mia patro alrigardis avon kaj mole diris:

— Paĉjo, mi timas, ke nia ĉasado ne okazos, ekblovis varma vento, ĝi degeligos la riveron.

Li silentis iomete, poste aldonis:

— Kaj vi diru al tiu, kun la azeno, veni en la kontoron. . .

Avo okulsignis al mi.

Ekstere la neĝo vere komencis de-

geli. La gutoj ekkantis sonore ka gaje. . .

— — — — —
La aminda maljunulo delonge estas mortinto, sed mi memoras lin tia, kia li estis dum tiu vespero. Lia vizaĝo estis inspirita kaj signita de epoko, kies kruda justeco donis al ni la rajton vivi inde kaj libere. Tiu justeco devigas nin esti ĉiam fidelaj al niaj rusaj fratoj kaj marŝi ĉiam kune kun ili.

¹ Frateto! Kolombeto! (rus.)

² Muĵiko (rus.) — vilaĝano (en senco de simplulo).

³ El la versaĵo „Mia preĝo“ de Ĥristo Botev, poeto-revoluciulo, vojevodo de ribeltaĉmento, pereinto en armita batalo kontraŭ la turkoj en 1876.]

Tenjo Tonĉeo

LA GRANDANIMECO KAJ LA NOBLECO DE LA RUSA POPOLO*

Kiam la ŝtatoj troviĝas en milito inter si, ordinare unu el ili estos venkinto kaj la alia — venkito. Do, kiom multaj estas la venkintoj! Sed kiom malmultaj estas tiuj, kiuj kronis sian venkon per vere belaj grandanimeco kaj nobleco.

Jam Aleksandro la Macedona, kiel asertas Plutarko, deklaris: „La plej supera grado de venko estas, ke ni ne agu kiel venkintoj.“ Ankaŭ Cicero havas la saman opinion: „Ekster la bezonoj de la milito mi portas ĉe mi nenian esksterordinaran malamon.“

Tiuj ĉi pensoj validas plene pri la rusa armeo dum la Liberiga Milito. Al la venkintoj ĝi kondukis kun la mirinda grandanimeco kaj nobleco de venkinto. Ekster la batalo ĝia malamo estis anstataŭata de la profunda rusa bonkoreco. La ekzemploj konvinkas pri tio, ne lasante kian ajn rezervon, sed ni turnu nin unue al la dokumentoj pri la komenco de la milito.

En la ordono, kiun la ĉefkomandanto voĉlegis en la tago de deklaro de la milito, oni diras: „La pacaj loĝantoj, sendepende de kiuj ajn religio kaj nacieco, estu por vi netaŝeblaj!“ La alvoko estas adresita al la soldatoj.

La alvoko de la imperiestro de la 1-a de junio 1877 entenas jenajn liniojn:

„Mahometanoj en Bulgario! Kun bedaŭro mi rememorigas la kruelaĵojn kaj krimojn kontraŭ la sendefenda kristana loĝantaro

de la Balkana Duoninsulo. La mondo ne povas forgesi tiujn teruraĵojn, sed la rusa aŭtoritato ne venĝos ĉiujn pro la krimoj, faritaj de viaj samreligianoj. . .“

Je la 9-a de julio ankaŭ generalo Gurko adresas sin al la soldatoj per ordono-alvoko. Nombrinte la venkojn de la taĉmento, kiun li komandis, li diras: „Mi estas ankaŭ konvinkita, ke vi pruvos, ke la rusa soldato venis tien ĉi ne por rabado kaj ruinigo, sed por defendi sanktan aferon. Vi pruvos al la tuta mondo, ke ni neniigas nur la armitan malamikon, sed ni indulgas la vivon kaj la proprajn de la nearmitoj. . .“

Tiel okazis dum la tuta milito.

Ĉe iuj okazoj, surbaze de rektaj observoj, Leo Tolstoj skribis en sia taglibro: „Grandega estas la morala forto de la rusa popolo!“ Guste tiu ĉi „grandega morala forto“ manifestiĝis dum la tuta Liberiga Milito, malgraŭ ke ĉiuj sciis pri la kanibalismo de la malamiko antaŭ kaj post la bataloj. . . Sed ni alpaŝu al konkretaj okazoj.

D. Ĥranov — personaj impresoj: „La tuta vojo en la direkto (de Sofio) al Dupnica (nun urbo Stanke Dimitrov — noto de la trad.) estis absolute plenplenigita kaj obstrukcita de jungitaj veturiloj de la loka turka loĝantaro, kiu estis fuĝanta el la urbo, samkiel de transportoj kun malsanaj kaj vunditaj turkoj. Oni ordonis, ke tiuj transportoj estu allasitaj pasi libere, kaj al la fuĝantaj turkoj oni proponis reveni en la urbon, kion multaj faris kun plezuro, ĉar la timo, ke la rusoj intencas murdi ilin ĉiujn, estis imaga.“

* Fragmento el la artikolserio „Po. la libero de Bulgario“, publikita en gazeto „Anteni“, n-roj 28 kaj 29/1977.



Kun la sama grandanimeco kondukis la rusoj ankaŭ al la turka loĝantaro en **M. Stara Zagora** — ili ne deprenis eĉ ĝian armilaron. Tio ĉi apenaŭ estis laŭdinda, ĉar eksciinte, ke la armeo de Sjulejman paŝao alproksimiĝas, la turkoj en la urbo komencis pafi kontraŭ la dragonoj. Sed ankaŭ tiu ĉi evidente kondamninda fakto ne sekvigas reprezaliojn. Estis kolektitaj nur la bejoj kaj la pli elstaraj turkoj, al kiuj generalo Stoletov en bona turka lingvo sugestis la neceson de plena subiĝo al la nova aŭtoritato. Kaj la maksimuma, kion la rusoj faris, estis lasi kelkajn personojn kiel garantiulojn.

Foje, kiam generalo Skobelev estis matenmanĝanta, oni venigis al li kelkajn kaptitajn turkajn soldatojn. Unu el ili, ege malsatiĝinta, genufleksis kaj etendis manon por nutraĵo. La vidaĵo ekskuis la generalon kaj li diris emociite: „La malfeliĉuloj, ili mortas pro malsato! Nu, mal-ligu ilin! Ili manĝetu, poste ni interparolos.“ Lia matenmanĝo estis disponigita al la kaptitaj malamikoj, kiuj nur antaŭ kelka tempo pafis ankaŭ kontraŭ lin.

Timigaj soldatoj sur la batalkampo, la rusoj estis dignaj venkintoj. Ĝis tia grado, ke en iuj okazoj tio ĉi faris strangan impreson al la fremdlandaj korespondantoj. Jen io skribita de ili — ĝi rilatas al la kapto de Osman paŝao:

„La rusoj, ebriigitaj de la venko, disdonante panon, monon kaj cigaredojn al la turkaj kaptitoj, estis forgesintaj la nudajn skeletojn de siaj kamaradoj, pro kiuj blankiĝis la batalkampo... La rusoj, estante noblaj venkintoj, forgesis, kiel iliaj kaptitoj estis ĉiam mortigataj, kiel la vunditoj estis finmortigataj dum la batalo aŭ forlasataj kaj kripligataj post ĝi... kaj ke en Pleven estis trovitaj nur du rusaj kaptitoj! — La rusoj forgesis la fajrojn, bruligitajn sur la ventroj de iliaj vunditoj apud Dolni Dâbnik, kaj tiom multe da barbarajoj kaj kruelaĵoj... Se la rusoj ne volas rememorigi ilin al si por manifesti noblecon de la sentoj, ni opinias justa, ke ili ne devas esti forgesataj eĉ de unu honesta konscio.“

Ĉu tio ĉi ne estas apologio de la rusa nobleco, de la rusa grandanimeco? Ne, la rusoj ne estis forgesintaj la kruelaĵojn de la malamiko — ĉu eblas forgesi vundon sangantan? Sed estas io pli forta ol la ven-

ĝo, estas io nobla — la rusa justeco, la rusa animo, la rusa korol Grandegaj, senlilmaj, kolosaj — kiel la tero mem de Rusio! Braveco kaj majesteco, sinofero kaj heroismo, eltenemo kaj sentimeco — tio ĉi estas la rusa armeo. Sed ĝi estas ankaŭ grandanimeco! Ĝi estas armeo-liberiganto — kiel ĝi povus malhonorigi sin, respondante al tiranoj per tiraneco?

Tial ankaŭ en la ordono al la armeo por ĉesigo de la militagoj (7 de februaro 1878) oni diras:

„Kaj dum vi ripozas, pruvu, ke la rusaj herooj, kiuj ne havas egalajn en la honesta batalo, estas ekzemplo pri ordo kaj certagardo de la nemilitantaj civitanoj, el kiuj ajn nacio kaj konfeso ili estus, gardo de ilia havaĵo kaj honoro, kaj montru, ke ne estos eĉ apartaj okazoj, kiuj povus meti eĉ plej etan makulon sur la akiritan per ŝvito kaj sango novan gloron de la rusa armilo.“

Kaj tiel okazis, kiel oni sugestas per la ordono. Eĉ kiam la rusa armeo plenigas la stratojn de la osmana ĉefurbo...

Iu franca filozofo skribas: „Ĉiam estas riske ekkredi, ke iu venkinta armeo plenumos la devojn, kiujn ĝi prenis sur sin rilate la urbon, kapitulacintan ĉe relative facilaj kaj favoraj kondiĉoj, kaj enlasi la ardiĝintajn pro la batalo soldatojn eniri ĝin.“ Kiu scias, eble li pravas, sed kun certeco oni devas deklari, ke li ne konis la indecojn de la rusa armeo.

Ni diris, ke rusaj armeoj troviĝis en Konstantinopolo — kaj tio ne por la unua fojo. Tamen neniam detruoj, raboj, eĉ plej malgrandaj damaĝoj. Sed estas konate el la historio, ke kiam sultano Mahmudo la Dua nenigis la janiĉaran korpuson kaj poste ankaŭ la derviŝojn, iliajn adeptojn, la malamikoj de la sultano-reformanto bruligis en Konstantinopolo incendion, kiu kaŭzis ruinigojn pritaksitajn je pli ol 15 milionoj da frankoj... Iu povas diri, ke tio ĉi estas interna afero. Li pravas, kaj la milito estas io pli malsama, ĉu ne? Tamen ni rememorigu al ni la penson, venintan el la antikeco, ke „La venkintojn oni ne juĝas“. Kaj ĉu la milito ne estas ĝuste la plej taŭga tempo por furiozado de ĉiaj pasioj? Sed tiuj ĉi venkintoj, tiuj ĉi liberigintoj, estis filoj de granda Rusio kaj inde plenumadis ĝis la fino siajn militstajr devojn.

El la bulgara: D. Haĝiev

Dufoje en la historio de Bulgario la granda rusa popolo etendis sian noblan manon por nia liberigo el sub fremda jugo. Ankaŭ nun Sovetunio sincere kaj malprofiteme faras ĉion eblan por helpi al ni defendi nian rajton je libera nacia ekzistado, ŝirmi nian landon kontraŭ fremda atenco kaj defendi nian justan nacian aferon.

La amikeco kun Sovetunio estas necesa kondiĉo por surreniro de nia kulturo. La historia, spirita kaj lingva parenceco de la bulgara kaj rusa popoloj malfermis brilajn eblecojn ĉerpi el la riĉaj trezorejoj de la soveta kulturo — la lumfonto de la tutmonda progreso.

La amikeco kun Sovetunio estas organika bezono por nia popolo, manifestado de dankemo al sia pli granda frato — la granda rusa popolo, al Sovetunio.

Por la bulgara popolo la amikeco kun Sovetunio estas tiel vivnecesa, kiel la suno kaj la aero por ĉiu viva estaĵo.

Georgi DIMITROV, 1946



NOKTA BATALO

(daŭrigo el n-ro 2)

Momenta silento. Eksonis pafo de la transa flanko. Do ankaŭ tie oni malkovris nin. . . Dank'al Dio! Niaj soldatoj ne lasis sin influi de la tento komenci senordan pafadon kontraŭ la pro nebulo nevidebla malamiko. . . Ili ne respondas. . . Maldekstre oni jam komencis pafadi: tie la turkoj ekpafis kvazaŭ blinde. Laŭ la timo, malordo kaj disa pafado estis evidente, ke ili scias nenion, ke al ili nur io ŝajnis videbliĝi, kaj ili pro nervostreĉiteco krakas kaj pafas por kuraĝigi sin „por ĉiu eventualeco“. Ni komprenas la sencn de ĉi tiu malorda krakado. Laŭ ĝi ni konkludas pri tio, kio okazas en la koroj de la defendantoj de l'tranĉeoj. Ankaŭ la soldatoj komprenas.

— Vidu, ektimis la kanajloj! — ilustras iu apud mi.

— Timas kiel blinduloj! — kompate diras alia.

— Verŝajne la niaj estas proksime.

— Cni ne povas vidi ilin.

La nebulo pendas kiel kurteno mallevita de sur la ĉielo inter ni kaj la soldatoj marŝantaj antaŭe.

— Post min, fratoj!

Kiu kriis? Kvazaŭ el metala brusto eksonis tiu ĉi krio plena de kaptanta entuziasmo. . . „Post min, fratoj!“ — probable diris iu el la oficiroj de la volontuloj. Kiel ŝtormo ektondris la komuna „hural“, plifortigata de la surdiga pafado de l'malamikaj salvoj kaj akompanata de la tamburoj. Ni vidas ankoraŭ nenion, kaj nin jam surverŝas varmega kuglopluvo. La unuaj ĝemoj perdiĝis en la komuna bruado de la atako, nevidebla, sed tial des pli terura.

La ĉencj de la pafistoj kaj de la volontuloj plenumis sian taskon.

Cni elpuŝis la malamikon en la unua linio de la tranĉeoj, tamen malantaŭ ili staris ankoraŭ pli timigaj

tranĉeoj. . . Nun miaj soldatoj devis komenci sian rolon kaj antaŭ la terura entrepreno en tiu ĉi minuto ĉe mi malaperis la persona sento — la timo pri mi mem. . . Male, oni povus diri, ĉio koncentriĝis en tio — kion fari, por ke niaj soldatoj ne kompromitiĝu kaj por ke la malnova gloro de la regimento ne perdiĝu en tiu ĉi minaca kaj nebula nokto.

— Via moŝto, — subite aŭdiĝis proksime de mi la voĉo de Tokmakov. — La kapitano ordonis, ke ni komencu! Jam estas tempo! Cni devas subteni la ĉenon kaj konkeri la pozicion per „hural“ La malamiko staras firme en siaj remparoj. . .

Antaŭ ni troviĝis sufiĉe kruta monta deklivo.

Mi ne memoras, kiel mi kuris supren. Io en mia brusto min emociis, io intime min puŝis antaŭen, ne permesante al mi halti. Ĝis tiu momento mi nur malklare prezentis al mi la spektaklon, kiu okazis supre. Tie la nebulo ne estis tiel densa. Laŭ la helegaj linioj de la pafado, kies ekbriloj vidiĝis en tiu ĉi nebula mallumo, ni rimarkis, ke grandaj malamikaj fortoj transiris en ofensivon. La kugloj kun malica siblado kaj frapado flugis kaj fosis la malsekan teron, zumbante kiel vespoj preter la oreloj kaj kunigis siajn variajn tonojn kun la obtuzaj ĝemoj de la vunditoj kaj kun la akraj verkrioj venantaj el la malamikaj batalionoj. Centoj da obusoj kun minaca fajfado transflugis la altaĵon, la senombraj konstelacioj de ŝrapneloj eksplodis kaj estingiĝis, semante ĉirkaŭe suferon kaj morton. Sed strange — tiuj suferoj kaj tiu morto kvazaŭ restis ie flanke. Ni ne rimarkis ilin kaj ne povis halti ĉe ili. . . Io granda, potenca kreskis en la animo! Mi ne scias, ĉu tion oni nomas bataleduko, sed mi komprenis nur ion — ke ĝuste



tio donas la venkon!

Ni ĉiuj moviĝis antaŭen, kiam subite niaj vicoj trafis la pafistojn haltintajn tie.

Antaŭ ili, inter la antaŭenirantaj amasoj de la turkoj kaj niaj vicoj nun leviĝis io malklara, nigra, nedifinita, kio perdiĝis en la mallumo dekstre kaj maldekstre. Tie, malantaŭ tiu nigraĵo aŭdiĝis obtuza bruoj, kaj supre, super ĉi tiu nigraĵo, eksplodis la ruĝaj fajroj de la pafadoj... Malantaŭ ili oni kriegis: „Allah! Allah!“ kaj inter ili tranĉe sonis iaj komandoj kaj la melankolia kantado de la turkaj signalkornoj.

Nun, kiam mi skribas pri tio, ŝajnas al mi, ke tiam pasadis horoj, sed tie ĉio okazis momente. Ĉio tuj fiksiĝis en la memoro, kaj la penso funkciis kun frapanta rapideco.

„Ilia tranĉeo!“ — mi tuj pensis.

— La ĉefa afero nun estas ne lasi niajn soldatojn halti, alie ili fuĝos returne, — diris la komandanto iranta apude kaj tuj ĝoje, sonore, gaje ekkriis: — Nu, bravuloj, nun ĉio finiĝos! Kun Dio! — Kaj li la unua ekkuris antaŭen.

Tokmakov tuj sin ĵetis post lin.

— Ne lasu la maljunulon pereil! — li ekkriis, suprenirante al la tranĉeo. — Ne lasu lin, infanoj!

Du rapide sin ĵetis post lin, kaj post ili sin ĵetis en densa maso nia roto kun fusiloj pretaj por pafado. Kiel poste evidentiĝis, la „infanoj“ ne perfidis la „maljunan ĉefserĝenton“. Oni piedpremis lin, kaj anstataŭ puŝi kontraŭ iun bajoneton de turka soldato, Tokmakov rulfalis sur la malkompakta grundo malsupren, kaj super li tuj pasis dekoj da piedoj...

La maljunulo longe ne sukcesis leviĝi. Nun oni diras „longe“, sed tiam ĉio okazis momente. Sed kiam li fine sukcesis leviĝi, la batalo jam bolis antaŭ li, kaj li nur malklare vidis en la nokta mallumo la siluetojn de niaj soldatoj. La bajonetbataloj ordinaras daŭras mallonge.

Eĉ nun mi ne povas doni al mi kon-

ton pri tio, kio okazis en tiu mallarĝa fosaĵo de la tranĉeo. Mi nur memoras, ke kiam ni ĉiuj rekonsciiĝis, flanke de ni agoniis mortantoj. Kriante „aman, aman“ (ho vel), antaŭ ni kuris la defendantoj de la tranĉeo, repuŝitaj per bajonetoj, kaj niaj soldatoj, peze spirante, sidis sur la terbenkoj de la tranĉeo. Ili evidente ankoraŭ ne komprenis, kion ili faris, kaj nun ripozis kaj kolektis novajn fortojn.

— Mi dankas vin, bravuloj! — kriis la rotestro, ĉirkaŭirante la okupitan tranĉeon. — Kion nur oni ne povus fari kun vi! Ne ekzistas maleblaĵo! Nu, maljunulo, kisu min! Vi montris hodiaŭ, kiel soldato devas kondukti. Nun ni devas rezisti, dum venos niaj trupoj.

— Ni rezistos! Ĉu nun ni povus ne rezisti?...

Nia ripozo ne daŭris longe.

Malproksime-malproksime, kiel al ni ŝajnis, leviĝis komence malklaraj krioj.

— Ha, nun, bravuloj, atentu bone! La turkoj reakiris iom da kuraĝo kaj tuj aperos! Ni devas ilin repuŝi!

— Ni repuŝos ilin!

— Jes, jes... Faru vian preĝon kaj atendu komandon! Kaj plej grave — ne pafu sen ordono! Renkontu ilin per bajoneto. Turko tute ne povas toleri nian bajoneton. Teruraĵo por li estas nur la rusa bajoneto. Ĝi estas pli timiga por li ol la kugloj! Ili flugas blinde kaj nur hazarde trafas! Sed la bajoneto — tuj, en la momento, minace atendas.

La turkaj baterioj jam komencis funkcii... Ilia ŝtala brusto ĝemis, kaj la obusoj ekflugis al nia ĵus okupita tranĉeo. Estis evidente, ke la interspaco estas bonege mezurita, ĉar la obusoj fosis la teron ĝuste sub niaj nazoj, surŝutante nin jen per malgrandaj terpecetoj, jen per grandaj.

— Mil diabloj! — aŭdiĝas la malkontenta krio de iu soldato, superŝutita de ŝtonoj kaj koto.

La linio de la turka pafado proksimiĝas. La kugloj, simile al sennom-

braj abelsvarmoj, ekflugis el la eks-
cititaj abelujoj kaj impetis al ni.
Kaj la sama zumado kiel ĉe abel-
svarmoj, kaj la sama denseco.

La turkoj enis kun sovaĝaj krioj,
kvazaŭ ili sin mem kuraĝigus kiel
infanoj, kiuj pro timo kantas en la
mallumo. Kelkaj el ili kuris antaŭen,
nerve kriante: „Allah!“. Ili ne scias
proksimiĝi mallaŭte, kaj ĉe la atako
mem la linio de la pafado malkaŝas
ilian forton. Kaj ni nun laŭ tiu ĉi
linio povis difini, ke kontraŭ nin
venas kvin batalionoj, ne malpli.
La tutan tempon Tokmakov iris tien-
reen malantaŭ niaj soldatoj kaj ri-
petis:

— Atendu komandon, bravuloj! Ne
pafu sencele! Lasu ilin proksimiĝi
kaj tiam ni ilin bruligos!

— Roto, fajron! — akre sonis ko-
mando.

La mortiga salvo ĵetiĝis rekte en la
vizaĝon de la malamiko. Momenta si-
lento. Nur la elĵetiloj de la kuglin-
goj krakas kaj oni aŭdas la krakadon
de l'ŝargado. Neniu soldato pafas
sen komando. La oficiroj sentas, ke
ĉio estas en iliaj manoj, ke la soldatoj
estas trankvilaj kaj sindetenaj. Aperas
certeco pri la hodiaŭa nokto. Evi-
dente, la pozicio restas nia. Sed an-
kaŭ la malamiko estas persista kaj
firma. La turkoj neniam montriĝis
tiaj. Videble, Osman paŝao tiun ĉi
fojon sendis kontraŭ ni siajn plej
bonajn fortojn.

— Roto, fajron! — denove eksonis
kiel la unuan fojon.

Oni salvis de pli proksima distanco.
„Allah, Allah!“ kaj ĝemoj aŭdiĝas el
la jam proksimaj turkaj vicoj. Denove
krakis la elĵetiloj. La du salvoj de-

vigis la turkojn halti por momento,
sed ili rapide leviĝis kaj denove iris
antaŭen.

Jen ili jam estas kelkajn dekojn da
paŝoj for de nia pozicio, jam estas
videblaj la pafilapreturoj kaj la de
loko al loko alkurantaj figuroj de
iliaj pafistoj. Ĉe la pafokflamoj oni
vidas iliajn brunajn vizaĝojn, lumi-
gatajn de la sange ruĝa brilo. Oni vi-
das ankaŭ la densajn masojn, sekvan-
tajn ilin. Venos la minuto, kiam la
roto estos inundita de tiu ĉi grandega
lavango. . . Mi atente rigardas niajn
soldatojn. Ĉiuj vizaĝoj kvazaŭ estas
fiksitaj tien, la fusiloj direktiĝas laŭ
la celilo, la pafilfaŭkoj apenaŭ mo-
viĝas — estas evidente, ke ĉiu sek-
vas per rigardo sian malamikon, kaj
laŭ lia proksimiĝo direktas la pafi-
lon. Ankoraŭ kelkaj minutoj, kaj la
roto preskaŭ ne plu povos rezisti.
Estas klare, ke la fortoj tute ne estas
egalaj! Dek malamikoj kontraŭ unu
nia soldato! Se nur unu cedus — neniu
soldato restus vivanta!

Denove sonas komando.

Oni pafas la salvon rekte en ilian
vizaĝon. En la bruanta lavango eke-
stas konfuzo.

La turkoj ne eltenis tiun ĉi teruron.
La antaŭe irantaj konsterniĝis, retiris
sin kaj premis la ilin sekvantajn. . .

La pafoj jam krake ŝutiĝis sur la
dorsojn de la forkurantaj turkoj.

Ni perfekte plenumis nian taskon.
La brua malamika lavango rule mal-
suprenkuris en la valon, oni aŭdis
nur la kraketadon de rompiĝantaj
trunketoj de la nerikoltita maizo pro
la pasado de kelkmil piedoj.

El la rusa: Rajna Konstantinova

*Ne estas forto, kiu povas elradiki la ĵarmilajn radikojn de la amikeco inter la
du frataj popoloj — bulgara kaj rusa, ĉar ĝi estas eterna kaj potenca kiel la
vivo kaj hela kiel la kredo en la estonto.*

Todor JIVKOV



REMEMORO PRI FLORA

Sia nomo estis Flora — diino de la floroj, sed mi konis ŝin jam blankhara avineto kun sulkiginta vizaĝo. Malgraŭ siaj okdek jaroj ŝi estis facilmova, kun gaja korco.

Avino Flora estis mia najbarino. Niajn loĝejojn disigis negranda korto kun fruktoarboj kaj rozarbustoj. Ŝi loĝis en propra dometo kun sia juna filo.

La maljunulino estis vidviniĝinta antaŭ multaj jaroj. Ŝia edzo estis naskita en Besarabio (Rusio) en bulgardeneva familio. Dekokjara li aliĝis al la bulgaraj volontuloj por partopreni la Rusan-Turkan Militon de 1877—1878. Li ĵuris sub la sankta standardo de Samara¹ kaj en la vico de la 3-a bataliono batalis ĝis la militfino. La paco lin trafis en la pitoreska urbo Plovdiv. Tamen la okcidenteŭropaj registaroj ne aprobis la packontrakton inter Rusio kaj Turkio kaj trudis revizion pere de konferenco, kiu okazis en Berlino en 1878. Tie oni diktis dispecigon de la ĵus liberigita lando je tri partojn. Plovdiv estis fiksita kiel ĉefurbo de la aŭtonoma provinco Orienta Rumelio. La volontulo el Besarabio restis en Plovdiv kaj aliĝis al la eksterleĝa Bulgara Centra Revolucia Komitato, kies iniciantinto estis la konata revoluciulo kaj politika publicisto Zafhari Stojanov. La 6-an de septembro 1885 la eksterleĝa komitato proklamis ribelon. La popolamasoj en Orienta Rumelio leviĝis kaj forbalais la administracion de la aŭtonoma regiono. Norda kaj Suda Bulgario unuiĝis. Nur la tria — sudokcidenta — parto restis sub otomana jugo.

Kiam okazis la Unuiĝo, Flora estis 16-jara fraŭlino. Svelta belulino, ŝi altiris la atenton de la besarabiano. Ankaŭ li plaĉis al ŝi. Baldaŭ post la interkonatiĝo ili interŝanĝis fianĉringojn kaj post kelkaj monatoj geedziĝis.

La edzo estis ege malkontenta, ke Sudokcidenta Bulgario restas sub otomana jugo, kaj blasfemis kontraŭ kanceliero Bismark² kaj la aŭstra-hungara imperiestro, kulpaj pri la nuligo de la kontrakto de San Stefano.³ Ankaŭ Flora malŝatis la regnojn de germanoj kaj aŭstroj. En ŝia koro ŝprucis amo al la rusa popolo, oferinta ducent mil soldatojn por la liberigo de sia frata slava popolo el sub kvincentjara otomana jugo. Post forpaso de la edzo ŝi restis fidela al lia testamento: neniam toleris, ke iu makulu la nomon de niaj liberigintoj.

Nemirinde do, ke ŝi la unua en la aŭtuno 1940 j. subskribis la popolpeticion al la parlamento pri amikpakto inter Bulgario kaj Sovetunio. La parlamento, kiel sciata, rifuzis la paktproponon subskribitan de cent mil bulgaraj civitanoj.

Kelkajn monatojn post tio avino Flora forte indignis vidante sur la stratoj germanajn tankojn. Tio aŭguris nenion bonan por nia lando. La urba administracio admonis la civitanojn akcepti en siaj domoj gastjon el la germana armeo. La domon de avino Flora vizitis oficisto kaj demandis, kiom da soldatoj ŝi gastigos.

— Neniom! — krude respondis ŝi. — Mia mizera pensio apenaŭ sufiĉas por la sola pano. Turnu vin al la riĉuloj!

Des pli granda estis ŝia indigno, kiam hitleranoj inside atakis la landon de la liberigintoj.

Intage, renkontante min antaŭ sia loĝejo, ŝi diris:

— Mi sonĝis pri sanga batalo. Intermilitis ruĝaj anĝeloj kaj nigraj satanoj. Furioza estis tiu batalo. Finfine venkis la ruĝaj anĝeloj.

Pia kredantino, avino Flora vidis bibliajn sonĝojn, kiuj aŭguris venkon por la sovetaj soldatoj. Mi respektis ŝian piemon kaj asertis, ke ŝia sonĝo nepre efektifiĝos.

Iumatene ŝi avertis min.

— Filo, mia, agu singardeme, ĉar oni vin spionas.

Avino Flora klarigis al mi, ke iu sinjoro kaŝobservas mian loĝejon nokte. Li eĉ petis restadi en ŝia dometo kaj gвати, kiu vizitas min.

Mi dankis al ŝi pri la averto kaj me interesiĝis pri la gvatisto. Lia personeco estis konata. Ĉiutage mi renkontis lin sur la strato, kaj ĉiam li kroĉis sur min sian suspekteman rigardon.

Mia eksterleĝa agado fine devigis min eskapi el la urbo kaj aliĝi al la partizanoj.

Je la 9 de septembro 1944 j. miloj da urbanoj renkontis nian partizanan brigadon sur la stratoj de Plovdiv. Defilante mi rimarkis la blankharan maljunulinon, kaj deiris el la kolono. Ŝi rekonis min kun radiant

mieno kaj kroĉis rozon sur mian ĉemizon, dirante emociplene:

— Bonvenon, karaj liberigantoj!

Estis klare, ke ŝi komparas nin, la partizanojn, kun la volontuloj, batalintaj ŝultron ĉe ŝultro kun la rusoj kontraŭ la otomana Imperio, kaj tio plenigis mian koron per kontento kaj fiero. Mi klinis min, kisis ŝian kadukan manon kaj postkuris la kolonon.

La milito kontraŭ hitleranoj furiozis en Jugoslavio kaj Hungario. Ĉiutage la fervojstacion de Plovdiv trapasis trajnoj kun sovetaj kirastrupoj. Sur la perono oni ofte vidis blankharan maljunulinon, kiu patrinece mansvingis al la nepoj de tiuj, kiuj antaŭ sesdekse jaroj liberigis Bulgariion el sub otomana jugo.

Ŝi estis avino Flora.

Samara — urbo en Rusio, nun Kujbiŝev, kie oni ellaboris la standardon de la bulgaraj volontuloj.

² Bismark — ĉefministro de Germanio.

Nun Eŝilkjoj — urbeto, kie je la 3 de marto 1878 estis subskribita la kontrakto signanta la finon de la Rusa—Turka Milito.

ORGANIZA VIVO

VINTRA AMIKA ESPERANTO-RENKONTIĜO EN KUBRAT (VARE — 78)

La 28-an de januaro 1978 u. Kubrat denove fariĝis centro de interesa E-aranĝo. La urba kulturdomo, ornamita per flagoj de la nacioj, partoprenontaj la renkontiĝon, atendis siajn gastojn.

La unua estis Rudolf Eichler el Schwarzenberg — GDR. Sekvis delegitaro el ĈSSR (urboj Koŝice kaj Prešov), gvidata de Daniel Papak kaj kvarmembra delegitaro el Hungario sub la gvido de Arpad Abonyi. La renkontiĝon partoprenis ankaŭ reprezentantoj de Vjetnamio — 4 junuloj, kiuj studas kaj praktikas en la agrikultura kooperativo „Ŝavetska Rusija“ — Kubrat. Alvenis esp-istoj el distriktoj Ruse, V. Târnovo, Gabrovo, Sumen, Tolbuĥin, Silistra, Razgrad.

Post la malfermo eksonis la himno de PR Bulgario kaj la „Espero“. Sekvis konciza raporto pri la agado de la loka E-societo „Progreso“ dum la periodo VARE-77—VARE-78.

Kun ĝojo la ĉeestantaro aŭskultis pri laŭdindaj sukcesoj: pli ol 47 esp-istoj partoprenis E-aranĝojn en Hungario, ĈSSR kaj Pollando, multaj partoprenintoj en la

E-aranĝoj en Gabrovo kaj Târgoviște, 120 abonintoj por „Bulgara Esperantisto“.

La renkontiĝon, dediĉitan al la 100-jariĝo de la liberiĝo de Bulgario el otomana jugo, salutis la prezidantino de la Urba Komitato de Patrolanda Fronto Ivanka Borisova. Salutis ankaŭ la reprezentantoj de GDR, ĈSSR, Hungario, Vjetnamio kaj la najbaraj E-klubo, iniciatintoj de VARE. Reprezentanto de LKK por la TEJO-kongreso en V. Târnovo, Todor Dimitrov, salutis kaj invitis la junularon partopreni la kongreson.

Post la solena parto grupo da lernantoj el la loka teknika mezlernejo prezentis belartan E-programon. Apartan ĝuon donis la esperanta komedio „La gastino“, prezentita de membroj de E-societo „Libero“ — u. Ruse. Vespere pli ol 150 partoprenantoj ĝuis distran programon el ŝercoj, dancoj, tombolo, viktorigo k. a.

Dimanĉe pli ol 100 esp-istoj ekiris al la arbaro. Tie sur la blanka neĝkovrita tero, denove ludoj, kantoj, fotado. Tagmeze en la arbardo okazis internacia kunsido, kiu pritraktis la karakteron de la ĝisnunaj



VARE kaj donis utilajn rekomendojn por la sekvontaj.

Je la 13-a horo okazis kortuŝa adiaŭo. K-do Eichler tralegis sian adiaŭan poemon, speciale verkitan por VARE. Salutvortojn diris ankaŭ k-doj D. Papak kaj A. Abonyi.

Dum la tuta tago funkciis E-bazaro. Estis aĉeteblaj diversaj esperantaĵoj: tranĉiletoj kun E-surskribo, insignoj, flagetoj kaj emblemoj, belarta literaturo.

La eksterlandaj gastoj restis semajnon en Kubrat. La delegitaro de la laborista konsum-kooperativo „Thury György“ — Varpalota, Hungario, kaj la estraro de konsum-kooperativo „Narkoop“ — Kubrat subskribis interkonsenton pri amikeco kaj kunlaborado pere de Esperanto. Ambaŭ estraroj devigis sin lerni la Internacian Lingvon kaj

uzi ĝin dum siaj renkontiĝoj, korespondado, salutletero, komerca reklamado, interŝanĝo de spertoj, fakuloj ka. En konvena momento la estraroj de la kooperativo kaj de E-societo „Progreso“ enmanigis memordonacojn al la gastoj.

Neforgesebla por ĉiuj partoprenintoj restos VARE-78! Per sia bona organizo, per sia ĉiam pli vasta internacia karaktero kaj per estonta praktika laboro surbaze de la interkonsento inter la menciitaj konsum-kooperativoj ĝi allogos novajn amikojn, instigos multe da oficistoj, laboristoj kaj diversaj fakuloj lerni la lingvon Esp-o.

Ĝis revido, karaj gesamideanoj! Ne forgesu: VARE estas ĉiujare, lastsabate januare!

Anton Antonov

Aktiva disvastigo de Esperanto en la distrikto de Stara Zagora

La E-lernojaro en la distrikto de Stara Zagora komenciĝis je la fino de septembro 1977. Jen la bildo de la kursoj ĝis la 15 de januaro 1978:

Gălâbovo: 2 kursoj por civitanoj, gvidataj de Kanju Kanev, kaj 1 kurso por lernantoj sub la gvido de Goĉo Mitev.

Kazanlâk: 3 kursoj por lernantoj kaj 1 por civitanoj kun gvidantoj Svoboda Damjanova, Penka Miĥajlova, Jordan Lalev.

Ĉirpan: 2 kursoj por lernantoj sub la gvido de Taŝko Georgiev kaj 1 por civitanoj, gvidata de Georgi Kolev.

Stara Zagora: 1 por civitanoj (progresintoj), gvidata de Slavi Janulov, 1 por fervojistoj, — gvidanto Tonĉo Valev, 1 por civitanoj (elementa) sub la gvido de Nejko Kunev, 2 en mezlernejo „Iv. Vazov“ kun gvi-

danto Anton Ivanov, 1 en la junpionira domo, gvidata de Elena Zloĉevska, 1 studenta — en la Supera Instituto de zootekniko kaj Veterinara Medicino — sub la gvido de Kina Sivkova — asistantino.

Măglij: 2 kursoj por lernantoj sub la gvido de Svoboda Damjanova kaj 1 por civitanoj, gvidata de Ivan Lesov.

Radnevo: 1 kurso por civitanoj, gvidata de d-ro Georgiev.

v. Enina: 2 kursoj por lernantoj sub la gvido de Neli Cankova.

v. Dălboki: 1 kurso por lernantoj kaj 1 kurso por civitanoj, gvidataj de Jordan Ĝervenkov.

Entute ĝis la 15 de januaro 1978 — 25 kursoj.

Jivko Kolev

ATENTU, VETERANOJ!

Enkadre de la ĉi-jara UK de Esp-o en Varno okazos internacia kunveno de la E-veteranoj.

Ĉiuj anoj de la bulgara Veterana Sekcio estas invitataj partopreni tiun internacian E-kunvenon, kie oni povos: aŭdi de sonbendo la voĉon de la fondinto de VEK M. Levin; partopreni la diskutadon pri nova statuto de VEK; aprobi proponotan novan insignon por veteranoj; partopreni la baloton por nova VEK-estraro.

La estraro de BEA decidis, ke ĉiu bulgara E-veterano, kiu ĝis nun ne estas honorita per la ora insigno de la Asocio, solene estu honorita per ĝi. Por tio necesas, ke li anoncu sin al la veterana sekcio pere de sia distrikta estraro. Krome ĉiu bulgara esp-isto, kiu jam 40 jarojn parolas Esp-on, devas sendi laŭ la sama maniero sian biografion kun detaloj pri sia E-laboro kaj fotoj el la lastaj jaroj. Nur tiel li povas esti akceptita kiel membro de sekcio „Veteranoj“ kaj honorita per la ora insigno.

LA KONGRESO DE LA AŬSTRA KOMUNISTA PARTIO:

223:13 POR ESPERANTO!

En Vieno en la komenco de decembro 1977 okazis la 23-a Kongreso de la Aŭstra Komunista Partio. Ĝi havas grandan signifon por la tutmonda E-movado. Responde al propono, kiun esperantista komunista kolektivo faris al CK de AKP, la kongreso okupiĝis pri la problemoj de Esp-o kiel rimedo de internacia interkompreniĝo.

La proponon (n-ro 49) legis laboristo el metalurgia fabriko. La rezulto estis:

223 kongresanoj voĉdonis por Esperanto

13 kongresanoj voĉdonis kontraŭ

10 kongresanoj ne voĉdonis.

Tiu bonega sukceso de Esperanto estas frukto de persista multjara laboro de komunistaj E-aktivuloj, kiuj informis, klarigis, agitis pri Esperanto. Ilia ekzemplo estas imitinda ĉiuloke en la mondo!

L: ŝ „Internaciisto“, n-ro 1/1978

KAMPANJO „ESPERANTO EN TURISMO“

PRI LA ESPERANTISTAJ TENDAROJ KAJ RENKONTIĜOJ

La somero de 1977 estis riĉa je E-tendaroj kaj renkontiĝoj. Multaj esp-istoj travivis agrablajn tagojn kun malnovaj amikoj kaj kreis novajn kontaktojn. Plej multajn tendarojn kaj alispecajn renkontiĝojn oni aranĝis en orienteŭropaj landoj. Legante la turisman E-kalendaron, kiun ĉiujare eldonas Monda Turismo, ni povas eltiri jenan resumon:

1. La daŭro de la tendaroj kaj renkontiĝoj estas 1—2 semajnoj.

2. Ilin partoprenas granda nombro de esp-istoj el la sama lando kaj tre ofte el proksimaj landoj. Dum la lastaj jaroj partoprenas ankaŭ multaj neesp-istoj. La organizantoj ne ŝatas tion, timante, ke ili domagos al la aranĝo.

3. La tendaroj plejparte havas abundan programon turisman (kulturaj kaj folkloraj prezentoj, propagandantaj ĉefe lokajn kaj naciajn interesojn, kaj priesperantaj fulmo-kursoj, prelegoj ka.).

4. Por partopreni 10-tagan ekspresan elementan kurson, dum kiu oni absolute ne povas finligni la materialon antaŭviditan por la unua grado, iuj vojaĝas eksterlanden, kvankam preskaŭ ĉiu en sia propra urbo povas partopreni elementan kurson, kiu donas solidan scion.

El ĉio ĉi estas klare videble, ke la diversaj someraj E-tendaroj k. a. renkontiĝoj okazas por amuzi kaj distri la E-istojn malmultekoste. Rigardante tion el nia, pli larĝa vidpunkto, ni ne povas eviti la konkludon, ke per tiuj aranĝoj ni klopodas enkonduki turismon inter la e-istojn, alivorte: forpreni la e-istojn de la ĝenerala turismo. Sola escepto estas la E-turismo, kiun organizas la vojaĝoficejo „Juwentur“ en Bydgoszcz en Kunlaboro kun pola E-Asocio.

En la nuna stadio de evoluo ŝajnas al ni, ke multe pli valorus la klopodoj enkonduki E-on en la turismon, t. e. montri al la turistoj ke Esp-o povas esti por ili tre utila — do, tute inverse: anstataŭ doni turismon al Esp-o, ni devas doni Esp-on al la turismo. Guste por tio estas fondita Monda Turismo — asocio por faciligo de la internacia turismo per aplikado de Esp-o.

Iuj povas konkludi, ke ni estas kontraŭ la okazigo de tendaroj kaj aliaj renkontiĝoj. Tute nel Ni nur deziras doni al ili pli da graveco kaj pli da praktika utilo, ke ankaŭ Esp-o profitu ion el ili, ne nur la esp-istoj.

Se oni parolas pri ĝeneralaj aranĝoj, kiel „Ora E-Feriado“ en Bulgario, „Varia Internacia Semajno“ en Hungario, „Internacia FERIA Semajno“ en Pollando ka., ili nur konkurencas unu al alia, ĉar la esp-istoj ne havas klaran kriterion por decidi, kien iri.

Ni proponas al ĉiuj el la ekzistantaj ten-

daroj kaj renkontiĝoj akcepti specifan karakteron kaj laŭ tiu karaktero aranĝi sian tutan programon (festivalo aŭ simple tagoj de folkloro, de kanzonoj, de foto-kino arto, de akvo-sporto — eĉ kun beleckonkurso, de poezio, revuo de popolkostumoj, de popolmuziko, de amuzaj ludoj aŭ turista orientiĝo, montgrimpado, semajnoj dediĉitaj al la geografio, astronomio, gastronomio aŭ aliaj temoj, kies listo estas neelĉerpebla. Tiuj aranĝoj estu por ĉiuj. Oni eĉ ne devas menci, ke la aranĝoj estas por esp-oj, por ke venu ankaŭ neesp-ista publiko. Tiel ekzemple al ĉiu festivalo venos tiuj, kiujn la koncerna enhavo interesas, kaj se la festivalo fariĝos altnivela kaj vere internacia, certe multaj lernos Esp-on, kiu estas ĝia sola oficiala lingvo.

Ni ne dubas, ke lokaj instancoj akceptos eĉ finance helpi la aranĝon, ĉar ĝi altiros multajn turistojn al loko, kiu ankoraŭ ne estas konata al turistoj. La organizantoj de E-turismo en Sofio, Bulgario, akceptis niajn sugestojn kaj komencis ĉiujare de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo okazigi „Gajajn Tagojn“ sub la devizo „Bona rido — longa vivo!“ en Sofio.

Tamen povas okazi, ke pluraj ripozlokoj volus aranĝi samspecan festivalon, eĉ en la sama tempo. Pro tio Monda Turismo estas preta helpi la organizadon. Ĝi kolektos la dezirojn de la organizantoj pri la karaktero de la festivaloj, pri la tempo kaj daŭro, kaj aranĝos la interkonsenton inter tiuj, kiuj kolizias. Ni ankaŭ volonte publikigus en la turisma E-kalendaro kaj en la asocia bulteno „Esp-o Turismo“ informojn pri tiaj specaj aranĝoj.

Se ni ricevos almenaŭ kvin proponojn, ni eĉ ellaboros por la organizantoj specialan strategion kaj taktikon, kiel agi por atingi plej grandan sukceson.

Interesuloj skribu al la gvidanto de la kampanjo aŭ al la sekretario de Monda Turismo, p. k. 45, Sofio, Bulgario.

Rezultoj de la konkurso de Monda Turismo

En „Bulgara Esperantisto“ n-ro 3/1977 estis publikigita konkurso de Monda Turismo pri malkovro de diferencoj en du pentraĵoj. Trafajn respondojn sendis 67 personoj.

La organizantoj de la 10 Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj-Naturamikoj, kiu okazis en Abaliget, Hungario, sendis premiojn al la gajnintoj: P. Berkhout (Krommenie) — Nederlando, Faizov F. (Ĉeljabinsk) kaj A. Vaitilavičius (Vilnius) — USSR, R. Sotirova (Sofio), D. Kanchev (Sliven) M. Boneva (Burgas) — Bulgario.



ĈU VI OPINIAS SIMILE?

Kiel trarompri el la „magia cirklo“?

Batalante por oficialigi Esperanton, ni ĉiufoje puŝiĝas al la „magia cirklo“, kiu nin premas sufoke. Civitanoj diras: „Mi ellernos la Internacian Lingvon, kiam ĝi estos rekonita.“ Decidopovaj instancoj deklaras: „Ni agnoskos ĝin, kiam ĝi estos vaste uzata.“

La teorie nerompbla cirklo, kies ekira punkto revenas al si mem, fakte montriĝas rezistema kaj senesperiĝa; tamen la esp-istoj, kiuj firme kredas je la revolucia destino de Esperanto, ne devas lasi la manojn fali. Ni devas obstine serĉi eliron, trovi la plej malfortan ĉeneron de la cirklo. Ĉu mi sukcesis pripalpi ĝin? Decidu nia vasta publiko!

Nia historio de 90 jaroj pruvis, ke la forto de Esp-o kuŝas en ties internacieco, t. e. neniuj landa asocio, aganta en izolo, kapablas atingi daŭrajn sukcesojn en la disvastigo de Esp-o. Aliflanke, fariĝas ĉiam pli kaj pli klare, ke Esp-o apenaŭ estos agnoskita de la popoloj samtempe pro neegalaj ekonomiaj kaj kulturaj pozicioj kaj pro diversaj lingvopolitikaj konceptoj. Krome, evidentiĝis, ke la grandaj nacioj, kies lingvo oficialiĝis en internaciaj forumoj, ne sentas brule la neceson de la Internacia Lingvo, eĉ oni rimarkas ĉe kelkaj el ili strebadon sankciigi la nuntempan, esence maljustan lingvan situacion.

Konsiderinte ĉion supre diritan, mi vidas unu racian kaj realan eliron.

Ekzistas pluraj landoj, kie la E-movado estas relative forta kaj kies lingvoj ne havas esperon fariĝi oficialaj en interpopolaj komunikadoj, kie malgraŭ grandaj fortostreĉoj la instruado de fremdaj lingvoj alportas plorindan rezulton, kie la lingva diskriminacio premas dolorige, kie la buĝeton ŝveligas grandaj elspezoj por tradukaj kaj interpretaj laboroj. Mi

pensas pri la jenaj mezeŭropaj landoj: Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Jugoslavio kaj Bulgario. Se en ĉiuj aŭ en almenaŭ tri el ili komenciĝus bone agordita kunlaboro, rezulte de kiu elformiĝus premgrupoj, la registaroj de la koncernaj ŝtatoj tre probable cedus al oficiala agnosko de Esp-o.

Kiuj antaŭkondiĉoj estas bezonataj por efektivigi la projekton

1. Necesas aperiĝi ĉi tiun artikolon en la presorganoj de la menciitaj landoj, por ke vasta aro da esp-istoj havu eblecon esprimi sian opinion kaj kompletigi la projekton.

2. Se nia E-publiko favore akceptos la proponon, la estraroj de la landaj asocioj diskutu la projekton kaj konsideru la kondiĉojn, inter kiuj ili emus kunlabori.

3. Delegitoj de la koncernaj LA kunvenu kaj ellaboru detalan strategion por efektivigi la planon en praktiko.

Por anticipe forigi kelkajn misopiniojn mi aldonas: 1) La projekto ne intencas limigi la laboron al nur tiu tereno: ĝi volas nur intensigi la agadon sur tiu kampo. 2) Mi scias, ke estraranoj de socialismaj landoj kunsidus ĉiujare kaj pritraktas komunajn problemojn, sed la kunagado ĵus proponita estus kvalite diferenca: maksimuma unuigo (kiom permesas la cirkonstancoj, la statutoj) de ĉiuj fortoj por sukcese efektivigi la trarompon.

Fine. Mi konscias, ke tia projekto montriĝas simpla nur ĉe la skribotablo, kaj ke ĝi levus amason da novaj problemoj, multaj el kiuj momente ne estas eĉ antaŭvideblaj. Tial mi petas vin pri profunda kaj multdirekta esplorado.

Géza Kurucz,
Hitel u. 10, Pszt. 16,
H-6000, Kecskemet,
Hungario

La tasko de la rubriko „Lingva laboratorio“ estas starigi je kolektiva diskutado la esperantigvajn tradukojn de malfacilaj vortoj kaj esprimoj kun la celo trovi la plej trafajn. Tiamaniere la redakcio kontribuos por la plialtigo de la lingva nivelo de la bulgaraj esperantistoj kaj aparte helpos la laboron de Esperanto-aŭtoroj, tradukistoj, redaktoroj, kompilantoj de vortaroj ktp.

La laboro en la rubriko estas ege grava, respondeca kaj utila por la bulgaraj adeptoj de Esperanto. Ĝi bezonas ĉies fortojn. Tial ni varme apelacias al ĉiuj legantoj de nia gazeto aktive partopreni tiun laboron, proponante malfacilajn vortojn kaj esprimojn, kiuj mankas en la ĝisnunaj E-vortaroj, ankaŭ sendante siajn proponojn pri traduko de jam publikigitaj en la gazeto vortoj kaj esprimoj.

Grupo de esperantistoj (Stefan Masarov, Simeon M. Simeonov, Violin Oljanov, Dimitro Haĝiev, Flori Nikolov, Kunčo Vălev) diskutis en kunsido la vortojn donitajn en n-ro 6/1977 kaj proponas jenajn tradukojn:

добивна промишленост — **akira industrio**

дърводобивна пром. — **lignoakira industrio**

рудодобивна пром. — **erc-akira industrio**

капитални вложения — **investaĵoj**

мека оран — **konvencia plugaĵo aŭ plugado** (statistika termino, mezurunuo ĉe mezurado de diversaj tipoj de plugaĵo aŭ plugado). Konvencia plugaĵo respondas al plugaĵo ĉe normala grundo kaj normalaj kondiĉoj de la grundo je profundeco de 15—20 cm).

феодал — **feŭdestro, feŭdomastro** (rilate al vasalo)

васал — **vasalo, feŭdulo** (tiu, kiu dependas de superulo pro feŭdo)

дегустация — **gustumo (unufoja), gustumado**

парк (автомобилен, трамваен) — **aŭtaro, aŭtofloto; tramaro, tramfloto; aŭtoremizo,**

tramremizo (tegmentita loko, kie oni sirmas aŭtojn, tramojn ks.).

реанимационен — **reanima, reviviga** при това — **krom tio, krome, (kaj) ankaŭ, same tiel, samtiel, kaj eĉ ktp.**

сервиз (автосервиз) — **aŭtoriparejo, aŭtoservo, aŭtoservejo**

оспорвам си:

Те си оспорват правата — **Ili neas (negas) la rajtojn unu al la alia = Ili neas reciproke siajn rajtojn.**

Те си оспорват първото място — **Ili konkuras pri la unua loko.**

интериор — **interno** (de domo ks.); **interloro** (pri pentraĵo prezentanta la internon de domo, scenon de hejma vivo ks.)

шип (медиц.) — **elkreskaĵo de ostoj, ostobeko, osteofito**

камерен състав — **ĉambra ensemblo, ĉambra trupo**

камерен музикален състав — **ĉambra muzik-ensemblo, ĉambra muziktrupo**

камерен оркестър — **ĉambra orkestro**

балетен състав — **baletensemblo, balettrupo**

пейс — **1. aŭtobuso** (pri laŭhora aŭtobuso)

2. kurso: kurso de aŭtobuso, de ŝipo ks. (La aŭtobuso faris tri kursojn)

юноша — **adoleskanto, adoleskulo** (juna homo post la infanaĝo, kiam ekfunkcias la seksaj glandoj; junulo inter 15—25 jaroj, junulino inter 12—20 jaroj)

управление на автомобил — **1. veturigo de aŭto, aŭtoveturigo; 2. aŭtostirado; 3. ŝoforado** (profesia)

военно съединение — **formacio (militista)**

светофар — **semaforo**

кухненски бокс — **kuir-niĉo**

ансамбъл (архит.) — **arkitektura ensemblo**

туристическа база — **turista bazo** (1. turisto domo, eventuale kun turista ilaro; 2. la tuta de turistaj domoj)

GRANDA VENKO DE BULGARA ŜAKMAJSTRO-ESPERANTISTO

Antaŭ nelonge finiĝis la konkurado en duonfinala turniro de koresponda ŝako por Eŭropa Ĉampioneco grupo Eŭ MGT92. Grandan sukceson atingis tie ŝakmajstro Todor Kânĉev en u. Sevlievo, esperantisto. Siajn partiojn li finis jam en januaro 1977. Kânĉev gajnis 11 poentojn el 14 partioj (9 partioj gajnitaj, 4 egalaj kaj nur 1 malgajnita). Kiam en oktobro la turniro finiĝis, oni konstatis, ke neniu atingis lin. Post li sekvis la soveta leningrada ŝakisto J. Berger (13.5 poentoj). Pri la intenseco de la turniro oni povas juĝi el la fakto, ke malantaŭe restis ŝakmajstroj Peterson kaj Engholm (Svedio), internacia majstro de koresponda ŝako

Richter (ĈSR), ŝakmajstro Nisman (Moskvo).

Todor Kânĉev fariĝis esperantisto antaŭ pli ol 10 jaroj. Li estas instruisto. En 1976 lia lernejo estigis ŝak-ĉampiono de la Ministerio de Popola Klerigo en Bulgario. Nun Kânĉev partoprenas en la II teama turniro de EŜLI — ĉe I-a tabulo de la bulgara esp-ista teamo „Ĉavdar“. Lia hobbio estas la rapidaj turniroj. Tial li kun intereso atendas la ŝakfeston en kadre de UK de Esperanto en Varno, kiam okazos simultanseanco, fulmrapida turniro kaj individua turniro.

Al nia samlandano Todor Kânĉev ni bondeziras grandan sukceson ankaŭ en la finala Eŭropa turniro!

Ivan Vojnov

Ljudmila Jevsejeva

UNUSOLA EN LA MONDO

Kiom da steloj sur nokta ĉielo!
Kiom da spikoj sur kampoj!
Kiom da verdaj folioj sur arbo!
Kiom da birdaj trilkantoj!

Nur unusolas la sun' en la mondo.
Nur unusolas patrin' en la mondo.

Letero de niaj sovetaĵ amikoj

La 29-an de januaro 1978

Karegaj bulgaraj fratoj, samideanoj!

La E-klubo ĉe la kulturdomo en urbo Hmelnickij (Ukrainio) estas en funebro: por ĉiam forlasis nin s-ano Dinko Ŝiŝkov el urbo Pârvomaj, nia granda bulgara amiko, sincera homo, kies vivo estis dediĉita al la aliaj. Dum la lastaj dek jaroj ni estis varmigataj per la varmo de lia amanta, vere granda koro. Liaj leteroj kaj sendaĵoj, saturitaj de profunda estimo al nia popolo, al nia kara lingvo, ĉiam ornamis niajn ekspoziciojn, dediĉitajn al frata Bulgario — bastiono de la tutmonda E-movado.

S-ano Dinko Ŝiŝkov sendadis al nia revuo „Amikeco“ siajn versaĵojn, tradukojn, revuojn ks. kaj ni havis dank' al li „Bulgaran paĝon“. En 1976 li provizis nian E-kurson per lernolibroj de Sarafov kaj Hesapĉiev, kaj niaj samideanoj krom Esperanto lernis ankaŭ la bulgaran lingvon.

Antaŭ nelonge li ligis nin kun esp-istoj de Silistra, nia ĝemelurbo. Li ankaŭ sendis al ni 5 invitilojn por UK en Varno kaj revis vidi nin dum la kongreso. Ni same revis vidi lin, premi lin varmege al niaj brustoj.

Ho, kiel malfacile travivi la eternan disiĝon kun la plej kara amiko!

Ni amike kunsentas kun vi, kun liaj filinoj kaj genepoj kaj kun la estraro de BEA pri la granda perdo. Kaj ni promesas firmiti ankoraŭ pli la amikecon kun frata Bulgario kaj kun ĝia esperantistaro por la venko de la grandega afero de la tutmonda paco, kies batalanto estis nia neforgesebla Dinko Ŝiŝkov. Akceptu niajn kondolencojn!

Prezid. de Hmelnicka E-klubo: *Andreo Rogov*

Vicprezidanto (persona korespondamikino de D. Ŝiŝkov): *Tamara Stojanovskija*.

Anoj de la klubo.



La 15-an de januaro post akcidento kaj mallonga malsanado forpasis 97-jara la E-veterano kaj dojeno Penko Petrov el u. Jambol.

Esperantisto li fariĝis tuj post kiam li fariĝis socialisto en la fino de la pasinta jarcento. En la Adresaro de Zamenhof li havis la n-ron 4774. Dum sia tuta vivo — ĝis la lasta spiro — k-do Penko Petrov laboris por Esperanto. Li korespondis kun miloj da esp-istoj el la tuta mondo, inter ili Zamenhof mem, R. H. Geoghegan, kiu proponis la verdan stelon kiel emblemon de Esperanto, H. Bolengbroke Mudie — la unua prezidanto de UEA, A. Michau — la prezidanto de la Unua Universala Kongreso de Esp-o en 1905 k. m. a. P. Petrov estas aŭtoro de multaj artikoloj pri Esp-o, disemataj en diversaj periodaĵoj, multjara delegito de UEA (de 1911 j.), partopreninto en multaj E-kongresoj — naciaj kaj internaciaj. Li gvidis sennombrajn E-kursojn por civitanoj, instruis la lingvon en mezlernejo. Malgraŭ sia aĝo li decidis partopreni la 63-an UK, eĉ preparis salutparoladon al la kongresanoj, en kiu interalie li diras:

„Mi estas ege kontenta kaj fiera, ĉar ĉiam mi estis unu el la fidelaj soldatoj de la paca kaj nobla armeo de la esp-istoj, armeo de pacaj batalantoj sen armiloj — kontraŭ la malkomprenoj kaj militoj inter la popoloj, por paco kaj interkompreno en la mondo.

Mi bondeziras al vi ĉiuj utiligi la fruktojn de la paca batalado de mia generacio. Vivu Esperanto! Vivu la paco! Vivu la interkompreniĝo en la mondo!“

Kapkliniĝon antaŭ la hela memoro de la sindona kaj fidela E-veterano Penko Petrov!

SOPIRO

Meksika kanto

Teksto kaj muziko; d-ro Viktor Gonzalez

Dolce

D Eb°

Ki- am re- ve- nos vi, ek- flo- ros la prin-

A7 G#°

tem- po, kaj es- tos la ĉi- el' la zu- ra- pu- ra

D D1

pli, kan- ta- dos la bir- dar' ĝoj him- najn en l'ar-

G G#° D Eb° A7 Gmb Ten. Ten. E, A7

ba- ro, kaj ĉi- o es- tos ĝo- jo, ki- am re- ve- nos

1. D 2. D F°

vi. Ki- am re- ve- nos o- ku- loj vi- aj

Em A7 Em A7 D° D E°

faj- ros per faj- ro de la a- mo, i- nun- dos min la

A7 C° A7 D° D

tu- tan per ĝo- jo kaj per lum', kaj mi- a ve- a

D1 G G#°

kor' vin ar- de so- pi- ran- ta de- no- ve re- vi-

D Eb° A7 Gmb E, Ten. A7 Ten. 1. D 2.

vi- gos ki- am re- ve- nos vi vi

Kiam revenos vi,
ekfloros la printempo,
lkajestos la ĉiel'
azura, ĉura pli.

Kantaĉos la birdar'
ĝojhin rojn en l'arbaro,
kaj ĉi- o estos ĝojo,
kiam revenos vi.

Ckuloj viaj ajros
per fajro de la amo,
inundos min la tutan
per ĝojo kaj per lum'.

Kaj mia vea kor'
vin arde sopiranta
denove reviviĝos,
kiam revenos vi.